FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita1952 | Numero 3 | Julio/Septembro 2011

Estis: IFK 2011 en Liberec/Ĉeĥio



IFK Liberec: Inaŭguro — Foto: Walter Ullmann

Estos: IFK 2012 en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo Germanio



Estos: IFK 2012 en Herzberg am Harz la Esperanto-urbo Germanio

Proksime de la germana limo, de la urbo Zittau okazis de 7an ĝis la14an de majo la ĉijara Internacia Fervojista Kongreso/IFK bonege organizita, travivriĉa "evento" laŭ fakaj, kulturaj kaj turismaj aranĝoj. En la komforta kongresejo kaj hotelo "Babylon" estis prezentitaj altkvalitaj kulturprogramoj dum la solena inaŭguro prezentis infangrupo "Jizerka" en popolaj kostumoj kantojn kaj dancojn el "malnova lernejo": vere refreŝiga. Sekvis vespere la koncerto de kanthoro Bendl, komencante per la ĉeĥa kaj esperanto himnoj, poste popolkantoj kaj en lasta parto kun arioj el operoj de Dvorak, Bizet, Verdi kaj Smetana. Longa aplaŭdo estis la danko de la kongreso. Aliaj bonkvalitaj prezentoj estis la koncertoj de simfonia orkestro ZUS Liberec, de junulara jaz-orkestro Big Band kaj de muziksaka orkestro Dudacek, ambaŭ ankaŭ de ZUS Liberec (muzik-lernejo).

Memkompreneble la fervojfakaj temoj ne mankis, ĉu estis la fakprelegetoj, la ĉefprelego kun la temo "Telefunkciigo de sekurecinstalaĵoj kaj centra-lizita trajn-trafikregado" (eble jam tro specifa) aŭ la terminara laboro, gvidata de nia membro d-ro Heinz Hoffmann.

Menciinda estas nepre la ĉeesto de kvarkapa delegacio el la venontjara germana kongresurbo Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, sub gvido de la urbestro S-ro Walter. Li sidis dum la inaŭguro kiel honora gasto en la prezidio. La Herz-berganoj prezentis jam la dimanĉan vesperon sian kongresurbon, okazonta de 19.-25an de majo 2012. La GEFA-estraro jam nun alvokas ĉiujn membrojn al multnombra partopreno kaj memkom-preneble estas ĉiam bonvenaj ofertoj de bonvolaj helpantoj en la preparlaboroj kaj dum la kongreso mem!

Sed reen al Liberec: ne eblas, ĉiujn eventojn priskribi, sed mencii mi devas la ekskursojn al monto Jested per telfero de CD, al Prago kaj al kasteloj cirkaŭ Liberec. Mi nur iom de la kongresa vivo priskribis. Finante iras nia elkora danko al la ĉeĥaj gekolegoj, kiuj vere grandanime akceptis ĉiujn pli ol 170 gekongresanojn el 18 eŭropaj landoj kaj organizis modelan kongreson.

Jen karaj GEFA-anoj, ni sekvu ilian ekzemplon kune kun la unika Esperanto-urbo Herzberg am Harz. La flagon ni jam transprenis en Liberec, vidu la foton!

Achim Meinel, prezidanto GEFA

Herzberg, die Esperanto-Stadt

Seit dem 12. Juli 2006 benutzt Herzberg den offiziellen Beinamen „die Esperanto-Stadt", in Esperanto: „la Esperanto-urbo". Dafür stimmten alle vier Parteien des Stadtrates. Der Herzberger Bürgermeister Gerhard Walter erhielt daraufhin innerhalb weniger Wochen hunderte Glückwünsche aus aller Welt.

Aktive Esperanto-Sprecher gibt es in Herzberg seit Mitte der sechziger Jahre, als Joachim Gießner begann, die neutrale Brückensprache im Herzberger Bahnhof zu unterrichten. Über die Stadtgrenzen hinaus wirkte Gießner jahrzehntelang als außerordentlich reger und geschätzter Vorsitzender des deutschen und des internationalen Eisenbahner-Esperanto-Fachverbandes. Zudem übersetzte er hunderte Lieder, Opern, Operetten, Bücher und Fachartikel ins Esperanto.

Seit einigen Jahren zieht besonders das Interkulturelle Zentrum Herzberg in der Grubenhagenstraße 6 Esperanto-Freunde aus dem In- und Ausland an. Es ist zugleich Filiale für Weiterbildung und Kultur des Deutschen Esperanto-Bundes und Bildungszentrum für den Internationalen Esperanto-Lehrerverband. In Herzberg finden das ganze Jahr über Esperanto-Sprachkurse, Ausbildungsprogramme für Esperanto-Lehrer und andere Bildungsveranstaltungen statt

Besonders erfolgreich erwies sich Esperanto für die Belebung der Beziehungen zur polnischen Partnerstadt Góra. Im April 2005 vereinbarten die Bürgermeister Gerhard Walter und Tadeusz Wrotkowski, Esperanto als neutrale, leicht erlernbare Sprache für direkte Kontakte zwischen den Bürgern beider Städte zu nutzen. Inzwischen wird Esperanto in den Schulen der Partnerstädte unterrichtet. Im August 2006 trafen sich zum ersten Mal Herzberger und Góraer Esperanto-Schüler zu gemeinsamen Sommerferien in Herzberg-Pöhlde. Ähnliche Begegnungen sollen auch in den kommenden Jahren organisiert werden – mit jungen Gästen aus noch mehr Ländern.

Vom 19. bis 26. Mai 2012 treffen sich die Eisenbahner-Esperantisten zu ihrem 64. Kongress in Herzberg.





Pri kio mortas efemeroj* ?

Efemeroj vivas nur kelkajn horojn. Ili aperas kaj malaperas en la monato junio abrupte kaj amase.

Efemeroj estas senbuŝaj insektoj kaj apartenas al la familio de retfluguloj. Ili ne kapablas sin nutri. La intesto estas plena de aero, por malgrandigi la specifan pezon* de la insekto. Tial ĝi pli facile povas ekflugi. La mallongan vivon plenigas la kopulacio kaj demeto de ovoj.

Ĉar ili ne povas nutri sin, tre rapide elĉerpiĝas la energirezervoj. Sed la mallonga vivo havas prologon: Kiel larvoj ili vivas ĝis plena evoluo. El al demetitaj ovoj ekestas en akvo vivantaj larvoj. Post la lasta elhaŭtiĝo aperas la preta insekto.

Amase la viraj efemeroj dancas vertikale ŝvebantaj. La inaj flugas rekte en la amason cele kopulacii. La viraj insektoj falas poste teren, dum la inaj bestetoj demetas la ovojn en la akvon.

*Specifa pezo
= rilato inter volumeno kaj substanco
*Efemero
= Eintagsfliege

Ĉi tiu kaj 83 aliaj interesaj rakontoj
vi trovos en
Flugantaj Folioj
kubalaitaj de Dieter Hartig.
Sonorilo por la
64a Internacia DJEF-Kongreso en 2012

en Herzberg, la Esperantourbo.
Per 10 € (+ sendkostoj)
vi subtenas la kongreson.
Demandu Dieter Hartig
August-Hagedorn-Alle 55, 28279 Bremen,
ehartig@t-online.d
Tel. (0421) 84 76 806.
Sparda-Bank
Konto 631329, BLZ 250 90 500.

IFEF deziras tutmondiĝi

IFEF estas mallongigo por Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, monda organizo de la fervojistoj-esperantistoj.

Ĝi estas faka, kultura organizo, neŭtrala rilate al nacieco, raso, sekso, religio, politiko ka sociaj problemoj, kun escepto de la lingva problemo en internaciaj rilatoj.

Fondita en la 5-a UK en 1909 en Barcelono, kun interrompo de la evoluo kaj agado dum ambaŭ mondmilitoj, ĝi do kunligas la fervojfakajn (kaj alitrafik-fakajn) esperantistojn jam pli ol jarcenton.

La nuna IFEF refondiĝis post la dua mondmilito en la jaro 1948 en Amsterdamo, kun 250 registritaj membroj, kaj en la sama jaro ĝi sukcesis ekaperigi sian revuon.

Ekde la jaro 1949 IFEF aranĝas ĉiujare sian kongreson, kiu okazas laŭ la invito de iu landa asocio, post aprobo de la Komitato. La lasta, 63-a IFEF-kongreso, okazis de la 7-a ĝis la 14-a de majo 2011 en la urbo Liberec, Ĉeĥio, kaj la postkongreso de la 14-a ĝis la 18-a de majo 2011 en Prago.

Konstanta evoluo post la dua mondmilito karakterizas la IFEF-movadon, kaj ĝi fariĝas la plej forta kaj la plej aktiva faka organizo de UEA.

IFEF havas gravan fakan Teknikan komisionon, kiu konsistas el Terminara kaj Fake Aplika Sekcioj.

La Terminara Sekcio funkcias ekde 1950.

Ĝi konsistas el fakuloj de la landaj asocioj, pluraj el kiuj eldonis fervojfakajn terminarojn.

La plej granda laboro kaj rezulto de tiu sekcio estis traduko de la seslingva surpapera faka terminaro de UIC (Internacia Fervojunio) enhavanta pli ol 15 000 pure fervojfakajn terminojn. La lasta eldono de la terminaro estas akirebla en 20 lingvoj sur kompakta disko. UIC prilaboras la difin-vortaron kaj paralele al tiu IFEF preparas Esperanto-varianton. De tempo al tempo la Terminara Sekcio eldonas periodaĵon por la kunlaborantoj sub la titolo *Terminara Kuriero* (TeKu), redaktatan de d-ro Heinz Hoffmann (DE).

La Fake Aplika Sekcio komencis funkcii en la jaro 1959, kaj nuntempe estas gvidata de inĝ. Ladislav Kovř (CZ).

Ĉiujare en la IFEF-kongresoj la plej grava programero estas la ĉefa prelego, kiun ĝenerale la organizanta lando preparas kaj prezentas.

Ekde la jaro 1981 tiu ĉi sekcio kompletigas la programon per la tiel nomata programero "fakprelegetoj". La nombro de diversnaciaj prelegantoj ĉiujare varias inter 6 kaj 12. Tiuj prelegetoj informas pri la plej freŝaj fakaj novaĵoj en la koncernaj landoj. Krom tiuj ĉi kongresaj programeroj daŭre aperadas fakaj artikoloj en la ilustrita revuo *Internacia Fervojisto*, kiu aperas sesfoje jare, krome ankaŭ en fervojfa kaj revuoj de la landaj asocioj. Per tiuj fakaj artikoloj oni kontribuas al la plimultigo kaj interŝanĝo de la fakaj konoj.

La teknika komisiono de IFEF ĉiujare aperigas kajeron *Fervojfakaj Kajeroj*, eldonante la plej valorajn fakajn prelegojn kaj aliajn fakajn tekstojn. Ĝis nun aperis 18 numeroj.

Grava atingo estas ankaŭ, ke pluraj landaj asocioj la fervoja horarlibro en Esperanto
La estraro eldonis *Historio de IFEF* en tri volumoj, pri la periodoj 1909-1968 (60-a fonddatreveno), 1909-1984 (75-jara jubileo) kaj suplemento pri la jaroj 1984-1999 (90-jara datreveno). Estas preparata nova kompletigita eldono de *Historio pri centjara agado de IFEF.*
La membraro de IFEF konsistas el aliĝintaj membroj de *laŭstatute organizi*taj landaj asocioj, individuaj membroj el landoj, kie ne ekzistas landa asocio, kaj honoraj membroj.
Krom en eŭropaj landoj, ekzistas landaj asocioj en Ĉinio kaj Japanio, kaj individuaj membroj en kelkaj aliaj landoj kiel Britio, Nederlando, Hindio, Svislando.
Ni invitas fervojfakajn kaj alitrafikfakajn esperantistojn aliĝi al nia fervojista E-movado, fariĝi asociaj aŭ individuaj membroj de IFEF.
Pluajn informojn vi povas peti de vialanda kontaktulo
aŭ rekte de la ĉefkomitatano:
Jindřich Tomišek, CZ-751 18 Řikovice n-ro 33, Ĉeĥio, tomisek.ck@seznam.cz,
aŭ de la IFEF-kasisto
Laurent Vignaud, 3 Allé du Haras, App 132, FR-49100 Angers, Francio, *laurent.vignaud@free.fr.*

Jindřich Tomišek, ĉefkomitatano de IFEF

La artikolo aperis
en la UEA-Revuo Esperanto,
104-a jaro, n-ro 1246 (4), Aprilo 2011



Vovoj al sukceso

Sub tiu titolo Dieter Hartig eldonis broŝuron. Nur per raciaj metodoj kaj rimedoj ni progresos kaj travivos sukceson. La broŝuro celas aktivigi la organizadon de nia asocio.
La vigligo de la grupa vivo, la aranĝo de sukcesaj kursoj kaj spertado en la varbmetodo estas la vojo, kiu gvidas al kontenta kaj interesa vivo en nia asocio.
Tiu studaĵo ne enhavas kompletan recepton por atingi sukceson. Ĝi nur instigas kaj konsilas, finfine vigligi nian movadon. Ekzistas sufiĉe da loko en la broŝuro en kiuj vi povas aldoni proprajn spertojn kaj ideojn kaj per tio plivalorigi mian intencon.

Sukceson en via agado
Dieter Hartig

Interesite?
Bonvolu kontakti
Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, DE-28279 Bremen
Tel. (0421) 8476806,
E-Mail: hartigesp@t-online.de

Unsere 97-Jahre alte Seniorin Elfriede Kruse hat uns ihr Domizil am Europaplatz in Nürnberg (betreutes Wohnen) in Reimen beschrieben:

Europaplatz

In Nürnberg am EUROPAPLATZ ist für Senioren Platz.
Dort entstand mit viel Geschick ein zweifaches Meisterstück.
Hier bist Du nicht allein, brauchst auch nicht einsam sein.
Du findest einen Freund, mit dem Du teilst Freud und Leid.
Du brauchst nicht mehr kochen, putzen oder einzukaufen.
Hast Du andre Begehren, wird man sie Dir nicht verwehren.
Du kannst Bücher oder Zeitung lesen, Rätsel raten, skaten
oder in der Sonne braten, Doppelkopf und Skat stets parat.
Du kannst ins Grüne schauen und an Blumen Dich erfreuen.
Und wenn Du Geburtstag hast, bist Du Ehrengast.
Hier feiert man Feste mit und ohne Gäste.
Wenn Du noch kannst und hast Lust, fahr mal mit dem Omnibus.
Und Du hast sie im Bau – Zahnarzt, Masseur, Friseur -
zu Deiner Verfügung ist auch eine Modenschau,
und was sehr wichtig ist, dass Dein Arzt Dich nicht vergisst.
Auch die Geistlichkeit ist stets gesprächsbereit.
Du kannst auch auf Deinen Namen einen Hund haben,
auch Dein Auto hat Platz auf dem Europaplatz.
Das ganze Personal ist ideal, Gymnastik, Gedächtnistraining
ab und zu ein Konzert – das ist doch was wert.
Die Familie, so Du eine hast, ist froh, dass sie Dich auch morgen in guten Händen weiß.
Die Enkel kommen gern zu einem Geplänkel,
sie führen Dich Hand in Hand von Bank zu Bank.
Wenn Du nicht mehr laufen kannst, lass Dich
ohne Bedenken an Stock und Rollator denken
Die Oma hat in ihren Taschen Weiteres zum naschen.
Mit dem Opa kann man lachen oder Witze machen.
Er kennt viele Witze und kann Geschichten erzählen.
Die Eltern im Garten auf die Kinder warten.
Und wir freuen uns auf ein Wiedersehen.



Herzberg – die Esperanto-Stadt

ruft uns zum

64. Internationalen Eisenbahner-Eperanto-Kongress

vom 19. bis 28.Mai 2012

Nach 1952 in Lindau, 1967 in Fulda, 1981 in Regensburg und 2003 in Dresden findet unser internationaler Kongress 2012 in Herzberg am Harz statt.
Wir alle sind aufgerufen, diese Veranstaltung zu unterstützen und auch teilzunehmen.
Das vielseitige Programm sieht neben den traditionellen Punkten wie den Arbeitstagungen, Fachvorträgen und Vorlesungen kulturelle Veranstaltungen und Ausflüge vor.
Hier eine kleine Übersicht:

Samstag, 19.5.„Interkona vespero“
Sonntag, 20.5.Feierliche Eröffnung, Gottesdienst, Stadtrundgang, Nationaler Abend
Montag, 21.5.Internationaler Ball
Dienstag, 22.5.Ausflüge nach Göttingen und Scharzfeld, Konzert
Mittwoch, 23.5. Ganztägiger Ausflug in den Harz u. a. mit der Schmalspurbahn
Donnerstag, 24.5.Ausflüge nach Nordhausen und Goslar
Freitag 25.5. Schlussfeier, Abschiedsabend
Samstag 24.5.Heimreise bzw. Reise zum Nachkongress in Berlin.

Das Aliĝilo wird unserer nächsten Ausgabe beiliegen.

Nach langer schwerer Krankheit verstarb im Alter von 65 Jahren
unser langjähriges treues Mitglied

Siegfried Koch

aus Melchow

Seiner Familie gilt unser tiefes Mitgefühl.
Er wird in unseren Erinnerungen unvergesslich sein.

Redaktfino por FE 4/2011 estos la 15.11.2011
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de